


KATALUNA ESPERANTISTO



OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO
numero 271 (38) - kvina epoko - decembro 1990



TARRAGONA

gastigos la 25-an
Katalunan Kongreson
de Esperanto
(informo sur paĝo 2-a)

JOAN AMADES i GELATS
la kataluna Esperanto-pioniro
(legu sur paĝo 3-a)



ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO/ KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO
(Enregistrata de la "Generalitat de Catalunya" en la unua Sekcio per n-ro 5785)
Apartat /Poŝtkesto, 2 0 - 08200 Sabadell- Catalunya/Katalunio. Telefonnumero (93)
716.3633(ekde lundo ĝis vendredo inter 20a kaj 22a h.) Kolektiva membro de Koo-
perativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la
Sciencoj San Marino

KOTIZOJ POR LA JARO 1990: Individua Abonanta Membro 1600 p-toj; Individua
Subtenanta Membro 3200 p-toj; Individua Dumviva Membro 32000 p-toj; Kolektiva
Membro 3200 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions - Agència 461 - Sabadell kontonumero 550 - 53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto: Jordi Carbonell i Pinyol; Vicprezidanto:
Maria Garcés i Coll; Ĝenerala Sekretario: Llibert Puig i Gandia; Kasisto: Óscar Puig
i Cánovas; Komitatanoj: Carles Berga, Bartomeu Costa, Josep Franquesa, Joan R.
Guiñón; Ĝirona Espero, Daniel Rubió, Josep M. Serrano.

KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Lluís Armadans, Ricard Jordana.

KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ:

Gabriel Mora i Arana (prezidanto), Perla Ari Martinelli, Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy
Brian Carr (Florluda Majstro), Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (Florluda
Majstro), Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Abel Montagut i Masip,
Giorgio Silber (Florluda Majstro), Joan Ramon Guiñón i Roset (sekretario).

FLORLUDAJ MAJSTROJ: Clarence BICKNELL (3aj IFL, Olot 1913), Artur DOMÉ-
NECH i MAS (6aj IFL, Reus 1916), Marian SOLA i MONTERRAT (6aj IFL, Reus
1916), Josep VENTURA i FREIXAS (8aj IFL, Girona 1921), Jaume GRAU i CASAS
(9aj IFL, Manresa 1923), Bernard GOLDEN (20aj IFL, Vilanova i la Geltrú 1980),
Giorgio SILFER (24aj IFL, Olot 1984), Timothy BRIAN CARR (28aj IFL, Barcelona
1988) Krystina UNGAR (30a, IFL, Palamós 1990)

PEDAGOGIA KOMISIONO: Lluís de Yzaguirre, Abel Montagut, Joan Torres, Josep
Tordera, Manel Marqués.

VORTARA KOMISIONO: Jordi Carbonell i Pinyol-Avda. del Paral.lel, 96-6è-Tel.
329.2481 - 241.9411, 08015 Barcelona.

KOLEKTIVAJ MEMBROJ: Centre d'Esperanto Sabadell, Apartat, 407, Papa Pius
XI, 130-tl.(93) 716.3633, 08200 Sabadell; Centre d'Estudis de la Biblioteca-Museu
Balaguer/Esperanto Grupo, St. Gervasi, 45, 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf);
Centre Excursionista Pulgcastellar/Esperanto - Grupo, St. Josep, 20- 08922 Sta.
Coloma de Gramenet (Barcelonès); Club d'Amics de la Unesco de Catalunya/
Departament d'Esperanto, Mallorca, 207 - pral. tél. (93) 253.9507, 08036 Barcelona;
Esperanto - Centro Tarragona, Apartat 1236- 43080 Tarragona; Esperanto-Fako
"S.C. Joventut Terrassenca", St. Francesc, 52 08221 Terrassa; Esperanto Grupo
"Jozefo Anglès", Apartat, 336-08190 Sant Cugat del Vallès; Firma Tero Esperanto
- Fako Centre Comarcal Lleidatà, Gran Via, 592 08007 Barcelona; Grup
Esperantista Sant Pau d'Ordal, Dr. Zamenhof, 12 tel. 899.3003 - 08739 Sant Pau
d'Ordal; Ĝirona Espero, Apartat, 509 - 17080 Girona; Hispana Esperanto - Fer-
vojlista Asocio, Apartat, 15027- 08080 BARCELONA; Secció d'Esperanto Centre
d'Estudis Comarcals d'Igualada, Baixada de Sant Nicolau, 21 - 08700 Igualada.
Dipòsit Legal: B-27362 - 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. 725.5091 Sabadell.



MOTIVOJ DUM KAJ POST LA
30-aj INTERNACIAJ FLORAJ
LUDOJ

La ROZO, la EGLANTERI' kaj la VIOLLO
-kies parfumoj mezepokaj portas,
de l'poezi', mesaĝon laŭ la volo
de l'Muzoj, en ĉi daŭra Fest'-bonsortas
ligante l'antaŭecon kun la nuno
de voĉ' virina, rava kaj kortuŝa,
ho poedin' varmkora kiel suno
el amo kaj esper'; regado buŝa
kaj cerba: flu' el sentiment' sen cedo!

Florluda Majstro kun impet' senhalta!
Estas, por vi, senmanka la bukedo
kaj, eĉ, la tuta bedo
- l'absolute' plej alta.

Al pioniro Pujulà, omaĝe
tiun tridekan Feston ni oferas.
La lasta tag' septembra, ja surplaĝe
kaj en etos' tiea, nin konkeras
je gloro lia pro la Fest' unua
kaj nia kompromis'
laŭ fideleco ĝua,
kaj kun gratul' al poetino Krys.

(La 30-an de septembro 1990-a
en Palamós)

Gabriel Mora i Arana

KOMARKAJ DELEGITOJ

Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf: Joan Inglada i Roig
St. Magí 20 - 3r. tel. (93) 893. 7176 - 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf)

Garrotxa, Ripollès: Joan Torres i Nalda. Escola Llar. Ctra. de la Canya,
s/n. tel. (972) 263829 - 17800 OLOT (Garrotxa)

Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La Selva: Ĝirona Espero, Apartat,
509 - 17080 Girona (Gironès)

Tarragonès, Alt Camp, Baix Camp: Josep M. Serrano, Apartat, 482
43080 Tarragona (Tarragonès)

Baix Ebre, Montsià: Josep Ma. Altadill - Berenguer IV, 23 tel.
(973)442009- 43500 Tortosa (Baix Ebre)

Illes Balears: Xavier Margais i Basi, Orient, 60 - tel. (971) 613830
07110 Bunyola (Mallorca)

Catalunya Nord: Joan Fernández, 21 rue Henri Matisse - F 66000
Perpinyà (Rosselló)

25a KATALUNA KONGRESO de ESPERANTO

La loka Grupo Esperanto-Centro Tarragona
akceptis gastigi la jubilean 25an Katalu-
nan Kongreson de Esperanto okazonta in-
ter la 1a kaj 3a de novembro 1991a.
Kun la venonta revunumero niaj membroj
ricevos la aliĝilon kaj la unuan infor-
milon. Antaŭvidu jam de nun via partopri-
no al nia plej grava aranĝo.



CENTENARI
**JOAN
AMADES**

Ci-jare Katalunio omaĝas la grandan kompilinton de la kataluna folkloro, Joan Amades i Gelats okaze de la centa naskiĝdatreveno de la homo kiu savis por la estonteco la preskaŭ forgesi-

tajn tradiciojn de nia miljara popolo. Li naskiĝis en Barcelono la 23an de julio 1890a kaj mortis ankaŭ tie en 1959. La gazetaro vaste raportis pri la vivo kaj laboro de la omaĝato kaj nepre menciis lian esperantistecon.

Estis vera aktivulo de nia movado, kiel pruvis, inter alie li prezidis KEF (Kataluna Esperanto-Federacio), estis kunlaboranto en nia Kataluna Antologio per la verkado de la ĉapitro "La katalunaj popolkantoj" kaj elstaris kiel redaktoro kaj mem iniciatinto de pluraj esperantlingvaj revuoj. Specimene ni reproduktas la frontpaĝon de la "Grafologia Revuo", kie li aperigis studon pri la karaktero de D-ro Zamenhof.

Sur la paĝoj de lia biografio "Zamenhof autor de l'Esperanto" en kataluna lingvo aperas reproduktaĵo de la kvitanca poŝtkarto de la aŭtoro de Esperanto al Joan Amades pri la ricevo de tiu unua numero de la menciita "Grafologia Revuo".

ZAMENHOF - FESTO ĈE NI

BARCELONO

La Grupo Firma Tero omaĝis la datrevenon per tre kompleta muzikprogramo dum la dimanĉa mateno 16a de decembro. Elstaris la kantado de 30-homa koruso, kiu aldonis en sia programo esperantlingvan kanzonon.

La Grupo de Esperanto ĉe Unesko-Klubo ankaŭ memorigis la eventon sabaton la 15an vespere per prelego de Narcís Fluvià, projekcio de vidbendo titolita "Esperanto tra la mondo", kantado de nia kataluna ensemblo, prezentado de libroservo kaj fina lunĉo.

JARO 1^a

JANUARO 1913

N.º 1

Grafologia Revuo

Intermita esperanta gazeto per vulgarigo de la grafologio



ADRESO DE LA REDAKCIO
Pau de la Creu, N.º 10, botiga
BARCELONO-HISPANIA
Sro. Joan Amades

CHEFREDAKTORO
Sro. Joan Amades

ENHAVO:

Pri grafologio.—Plena kurso de grafologio.—Gravaj klarigoj.—La karaktero de D-ro Zamenhof.—Grava aviso.—Scilgo.


Car nia omaĝato sendube meritas pli ampleksan artikolon pri siaj esperantistaj meritoj, ni petis tion fari al la direktoro de la Muzeo de St. Pau d'Ordal, s-ro Lluís Ma. Hernández Yzal kaj li promesis sendi verŝajne ĝustatempe por publikigo en nia venonta revuo.

SABADELL

La loka Grupo "Centro de Esperanto Sabadell" okazigis la ĉiujaran Zamenhof-Feston liberaere sur la Avenuo samnoma, inter alie kun prezento de diversaj alternativaj lokaj movadoj kiuj montris sian solidarecon al nia movado ankaŭ alternativa. Ĝi okazis dimanĉon la 16an de decembro dummatene.

Eventuale aliaj Grupoj memorigis la datrevenon, sed nia redakcio ne estis informita. Tuj ricevotaj raportoj ni volonte aperigos en nia venonta revunumero.

KRUCVORTENIGMO N-RO 6 de Pedro M. Martin i Burutxaga



HORIZONTALE:

- En konstrustilo antaŭa al la gotika (8). Kvin (1)
- Osmio (2). Aŭtomobila simbolo: Rumanio (1). Kun granda fervoro aŭ entuziasmo (5)
- Pola monunuo (5). (inverse) Itala urb' (4)
- Japana urbo (5). Preskaŭblinda bestet' kiu vivas subtere (4)
- Vokalo (1). Aŭtomobila simbolo: Finnlando (2). Pronomo (2). Vokalo (1)
- Kaŭzanta morton (6). Svisa rivero (3)
- (inverse) Besto parencas al muso, sed pli granda (4). Speco de arbo (5)
- Osta malsano (9)
- Vokalo (1). (inverse) Talio (2). Plej malgranda parto de la materio (5)
- Portugala vira nomo (4). Femaloj (4)

VERTIKALE:

- De sama koloro kiel rozoj (9)
- Norvega ĉefurbo (4). Malgranda (3). Jodo (1)
- Mil (1). Malhelpo, baro (8)
- Ne natura (10)
- Nitrogeno (1). Du vokaloj egalaj (2). Aŭtomobilaj simboloj: Luksemburgio, Tajlando (1,1). Oksigeno (1)
- Kvar (2). Koncernanta socian komunajn kunpropaj lingvo, kutimoj, ktp (5)
- Eligi harmoniajn vortojn (5). Verbo esprimanta ekziston (4)
- (inverse) Konsistanta el aero (4). Parola instig' al la plenumo de ago aŭ devo (5)
- Numeralo (3). Bona odoro (5)
- Lasta parto de la tago (7). Plurala finaĵo (2)

Ni invitas vin partopreni en nia sesa krucvortenigmo kaj la solvon nepre sendu ĝis la 31a de marto 1991.

ĈE LA VOJNODO

Pasintan 3an de junio inaŭguriĝis ĉi tiu nova Esperanto-Centro kiu celas spiritan kreskon individuan kune kun la aliaj, en harmonio kun la naturo.

Nia Asocio pretigos kompletan informon pri la nuntempe ekzistantaj restadejoj en Eŭropo, laŭeble aperigota en la venonta revuo, por ke niaj membroj antaŭvidu viziti ilin kiel la plej bona rimedo praktiki la lingvon kaj fortigi nian komunan senton.

KOMUNA KONGRESO DE ESPERANTO-FEDERACIOJ DE LANGVEDOKO-RUSILJONO KAJ PROVENCO

Okazos la 13an kaj 14an de aprilo 1991 en la Junuldomo de ARLES. Ebleco tranokti kaj manĝi favorpreze en loka Junulgastejo. Nia Asocio volonte sendos al ĉiuj partantoj kompletan informfolion. Estus bone ke niaj Grupoj antaŭvidu la eblecon organizi komunan vojaĝon al la Kongreso de niaj najbaroj.

Se vi ŝatas la enigmojn jen de nun nova revuo pri via hobbio kaj en Esperanto. Abonu rekte aŭ tra nia Asocio.

EKAPERIS
LUKSE PRESITA
▼
dumonata
SPECIALA REVUO,
pri
KRUCVORTOJ
kaj aliaj
SPRITAJ LUDOJ
(Ŝaradoj, rebusoj, anagramoj, puzloj...)

ENIGMO

Kun Konstantaj rubrikoj:
ŜAKO, GOO, SKRABLO
CIVILIZAJ SEKRETOJ
(N^o 1 - Majaa skribaĵo)

Provnumero (Kun abontarifo kaj rabatoj por nepagipovaj landoj)
HAVEBLA KONTRAŬ 1 IRK, ĈE:
Revuo «ENIGMO»
BP 7 - 31914 - Toulouse - Cedex - FRANCIO

ENLUMAS MIN SENLIMO

RECENZO de
Gabriel Mora i Arana

ENLUMAS MIN SENLIMO. Antologio de la itala poezio nunjarcenta. Redaktis kaj prinotis: Carlo Minnaja. Tradukis, sendepende, naŭ persona skipo. Eldonis: Kooperativo de Literatura Foiro. Portretoj: G.L. Gimelli. Paĝoj: 276. Formato: 21 x 15 cm. Unua eldono: 1990. Prezo: 40 CHF.

Sendube, la itala poezio de la nuna jarcento tre inde estas prikonsiderita, pritraktita kaj antologiita en tiu densa volumo kiu titoliĝas poezie ENLUMAS MIN SENLIMO, kiun redaktis plenkonscie Carlo Minnaja laŭ plenmerita traduklaboro de naŭ signifoplenaj esperantlingvanoj kaj agnoskitaj sciantoj pri poezio: G. Cappa, C. Conterno, G.L. Gimelli, C. kaj L. Minnaja, M. Nervi, G. Pisoni, N. Rossi kaj G. Silfer, kaj kun la fina kaj teknika redaktorado fare de Perla Ari Martinelli.

La poezio floras abunde, de ĉiam, en la itala duoninsulo: de antaŭ Vergilio kaj Horacio en la latina, kaj de Danto kaj Petrarko ĝis la plej gravaj poetoj itallingvaj nuntempaj. Do dum multaj kaj multaj jarcentoj la poeziarto rangis tie altpinte, kaj plej diversaj skoloj, stiloj kaj esprimmanieroj konkretigis la stadiajn periodojn kiuj estas konstante trastudataj kaj reliefigitaj en la paĝoj de literaturaj traktatoj.

Giordano Azzi jam redaktis traduke esperantlingvan italan antologion kiu ne tro preterpapas la unuajn jarojn de nia jarcento. Do, la verko kiun evente prezentas Kooperativo de Literatura Foiro, estas valorega ĝisdatigo pri la fronda panoramo de la itallingva poezio, kiu fieras pri la Nobel-laŭreatoj Quasimodo kaj Montale, kiel pli antaŭe pri Carducci.

La verko kiu motivigas ĉi-tiun recenzon prezentas al ni 34 modernajn poetojn kaj la esperantan version pri 166 poemoj el ili. Diversaj stiloj paradas, triumfe kaj allogé: formalismo laŭ metriko, stancoj, ritmoj kaj rimoj; ekspresionismo kaj impresionismo; surrealismo kaj futurismo, kaj pri esprima hermetikeco aŭ tute simpla abstrakteco. Jen, do, panoramo plej varia laŭ natura kaj konstanta dinamika evoluado kaj libereco de la moderna itala poezia fenomeno, kiun tiu grava antologio prezentas al ni.

Clelia Conterno Guglielminetti bonŝance povis, ĝustatempe, verki tre profundan esean enkondukon. Kaj por nia pleja profito la finaj paĝoj konsistas el notoj kaj komentoj pri verkoj kaj aŭtoroj. Kaj tuj antaŭ ol prezenti la elektitajn poemojn de ĉiu antologiita poeto, desegna portreto kaj biografieto agas enkondukiste, situigante pli bone nin.

La naŭ tradukintoj, kies nomojn mi jam skribis pli supre, donas sufiĉan garantion pri ĝusta esperantigado, malgraŭ ke ni scias kiel malfacila tasko estas tiu traduki poezion, kaj des pli kiam oni devas pritrakti lingvon tiel poezie spertiĝinta kiel la itala, kaj aŭtorojn tiel famajn. Tial, Montale, Ungaretti, Quasimodo, Luzi, Penna, Pavesés, Bassani, same kiel la aliaj ceteraj, ankaŭ brilas splende en Esperanto, ĉar la supleco de la internacia lingvo ree pruvas, en lertaj plumoj, sian kapablon.

Jen aĉetinda kaj trastudinda libro por nia propra ĝuo, kaj por danke gratuli la entreprenadon de LF-koop. Kaj, jen atendinda koincido kun tiu mirinda volumo je neelĉerpeblaj profito kaj ĝuo: en kataluna lingvo ĵus publikiĝis similan antologion, nome "Poesia italiana contemporanea", tradukita de Narcís Comadira, Xavier Riu i Joan Tarrida, laŭ editorado de "Edicions 62".

KONGRESO DE SAT-AMIKARO

Okazos en Amboise dum la paskaj tagoj de 1991 (de la 30a de marto ĝis la 2a de aprilo). Informas: Marko Noulin-Les Monts F-41 360-LUNAY tel. 54721511


POR-ESPERANTA MORMONARO

sendos al vi sian revuon senpage se vi petas ĝin ĉe la redakcio: rue Haute Colline, 28 B-4950 BEAUFAYS (Belgio)

INTERNACIAJ floraj ludoj

La Instituto de la Konservantaro de la Internaciaj Floraj Ludoj alvokas ĉiulingvajn esperantistajn geverkistojn konkurse konkuri per siaj plej valoraj verkoj en la tradicia trobadora FESTO DE LA 31aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ (1909/1991).

ORDINARAJ PREMIOJ



R O Z O


al la plej kvalita antema poemo, originale verkita en Esperanto.

E G L A N T E R I O

al la plej kvalita poemo, je temo laŭvole elektita de la aŭtor(in)o, originale verkita en Esperanto.

V I O L O

al la plej kvalita humanisma, etika aŭ priesperantisma poemo, verkita originale en Esperanto.




A M A R I L I D O

al la plej kvalita beletra novelo, fabelo, originale verkita en Esperanto.

A M A R A N T O

al la plej kvalita beletra eseo, originale verkita en Esperanto.



D I A N T O

al la plej kvalita eseo verkita en Esperanto aŭ en la kataluna pri la kulturo kaj historio de Esperanto en Katalunio. La enhavo de la Muzeo de Esperanto en Sant Pau d'Ordal estas je la dispono de la eseistoj.

K O N V A L O

al la plej kvalita traduko Esperanten, ĉu versa ĉu proza, el katalunlingva verko.

E D E L V E J S O

al la plej kvalita traduko katalunlingven, ĉu versa ĉu proza, el Esperanto-verko.




El la Statuto de la Instituto de la Konservantaro de la Internaciaj Floraj Ludoj

16. La Instituto: [4] proklamas dum la Festo tiun laŭreaton kiu iĝis Florluda Majstro, t.e. kiu aŭ jam gajnis tri Naturajn Florojn, aŭ jam gajnis du Naturajn Florojn plus minimume ses poentojn, aŭ jam gajnis unu Naturan Floron plus minimume naŭ poentojn, aŭ jam gajnis minimume dek du poentojn. Ordinara Premio valoras unu poenton.


17. [1] La Ĵurio konsistas el sep Ordinara Konservantoj.

21. [1] La partopreno en la Konkurso estas senpaga; [2] oni ne rajtas konkursi pere de verkoj jam premiitaj kaj/aŭ publikigitaj; [3] oni povas konkursi per maksimume tri verkoj en ĉiu Premio; [4] la tajpitajn verkojn oni prezentu en formato DIN A4: la versa verkoj devas ampleksi maksimume tricent versojn; la proza verkoj devas ampleksi maksimume kvin mil vortojn; [5] la verkojn oni sendu, po sep ekzempleroj, nur ĝis la limdato -laŭ la poŝta stampo- al la Sekretario de la Instituto; dek tagojn post la limdato la Sekretario rifuzas konkursantajn verkojn; [6] eseo aparte kunhavi bibliografion; tradukinto aldonu sep fotokopiojn de la originalo; [7] la aŭtoreco de ĉiu verko nepre devas resti nekonata:


E K S T E R O R D I N A R A J P R E M I O J



M I O Z O T O
(cele al instigo kaj kuraĝigo de infanoj ĝis maksimume 14-jaraĝaj) al la plej kvalita verko, ĉu versa ĉu proza, originale verkita en Esperanto kaj je temo laŭvole elektita de la infano.



G A L A N T O
(cele al instigado kaj kuraĝigo de debutantaj verkantoj) al la plej kvalita verko, ĉu versa ĉu proza, je temo laŭvole elektita de la aŭtoro kaj originale verkita en Esperanto.



Laŭ bela
kutimo
trobadora
olde
tradicia,
gajninto
de Premio
NATURA FLORO
oferas ĝin
al homo
je sia
elekto, kiu,
proklamita
Reg(in)o
de la
trobadora
Festo,
d'isdonas
la aliajn
premiojn al
la koncernaj
laŭreatoj.



Limdato: 28an de februaro 1991.
Adreso de la Sekretario: Joan Ramon
Guiñón i Roset.
Carrer Vilamarí 106/108 baixos int. 2a.
E-08015 Barcelona (Katalunio).

Ĉiu verko havu titolon kaj pseŭdonimon, indikojn pri aĝo kaj sekso de la verkisto kaj pri la premio por kiu oni konkur-
sas; aŭtoro kunsendu por ĉiu verko
koverton fermitan (en ĝi enestu slipon
kun nomo kaj adreso) sur kiu oni skribu
la titolon kaj la pseŭdonimon; [8] la
Sekretario antaŭsciigas al la premioj
la Verdikton por ke ili povu ĉeesti la
Feston aŭ elekti anstataŭantojn.

22. La aljuĝo okazas jene: [1] Ĉiu
Juriano asignas al la unuopa verko kaj
noton de nulo ĝis dek pro la Lingvo, kaj
noton de nulo ĝis dek pro la Stilo, kaj
noton de nulo ĝis dek pro la Formo; [2]
la noto plej alta kaj la noto plej
malalta asignitaj al la unuopa verko kaj
pro la Lingvo kaj pro la Stilo kaj pro
la Formo estas neglektataj por la kalku-
lo de la aritmo; [3] se verko ne atingas
almenaŭ aritmon de sep poentoj, ĝi estas
eliminita; [4] la Kunveno de la Ĵurio
rekonsideras ĉiujn verkojn, kiuj atingis
almenaŭ aritmon de sep poentoj. Voĉdon-
ado por aljuĝi la Premiojn, okazas jene:
[a] Ĉiu Ĵuriano voĉdonas maksimume por
tiom da verkoj, kiom nombro da neelimi-
nitaj verkoj ekzistas minus unu (ekz.:
ok verkoj, do oni voĉdonas maksimume por
sep el ili); [b] tiu kandidato, kiu
ricevas malplimulton de la esprimitaj
voĉoj estas eliminata: se pluraj ricevas
saman minimumon, ili estas eliminataj;
[c] oni ree voĉdonas, ĝis unu el la
neeliminataj verkoj ricevas absolutan
plimulton de la esprimitaj voĉoj; [5] la
Ĵurio aljuĝas la Naturan Floron al la
plej valora verko el la aljuĝitaj Ordinaraj
Premioj, se ĝi atingis, almenaŭ
aritmon de ok poentoj; [6] la Ĵurio
rajtas aljuĝi Honorajn Menciojn.

23. La gajnint(in)o de la Natura Floro
elektas la Reg(in)on de la Festo.

24. [1] Ĉiu premiito ricevas Diplomon.

25. Aŭtoro konsentas, ke la rajto pri
unua publikigo de premiita verko apartenas
al la Institucio, kaj devigas sin ne
publikigi ĝin aliloke dum la postaj ses
monatoj ekde la dato de la koncerna
Festo de la Internaciaj Floraj Ludoj.
Post tiu tempo, la gajninto havas la
rajton publikigi ĝin aliloke, sub la
kondiĉo ke la verko aperu kun indiko pri
la sukceso ĉe la Internaciaj Floraj
Ludoj. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro,
sed li konsentas cedi ĝin senpage al la
Institucio okaze de eldono, propagando,
dokumento aŭ antologio de la Internaciaj
Floraj Ludoj. Aperas premiere en Kataluna
Esperantisto kaj, eventuale, en
Literatura Foiro, la verkoj premiitaj.

Honoraj Konservantoj: Kataluna Esperanto-Asocio, Kooperativo de Literatura
Foiro, Muzeo de Esperanto en Sant Pau d'Ordal, Kataluna Esperanto-Junularo.
Ordinaraj Konservantoj: Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy Brian Carr (IFL-
Majstro), Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (IFL-Majstro), Joan Ramon
Guiñón i Roset, Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Perla
Martinelli, Abel Montagut, Gabriel Mora i Arana, Giorgio Silfer (IFL-
Majstro), Krystyna Ungar (IFL-Majstro).

Akademio Internacia de la Sciencoj 7-14-15-20
Alòs, H. 4-5-18-31-37-39-40
Amades, J. 10-26-41-43
Aranĝoj diversaj 6
Argemí, A. 33
Armadans, Ll. 35
Asembleo 34
Asociació Amics de l'Esperanto 18
Barcelono 18-43
Benech, E. 23
Benet, A. 33
Budapeŝta Informilo 22-23
Carbonell, J. 11
Casañas, J. 33
Ĉe la Vojnodo 44
Ĉu vi scias ke... 34
Docal, S. 34
Edistudio 7
Enigmo 44
Enlumas min senlimo 45
Eŭropo, debato pri 17-19-33
Eŭska E-Asocio 9-13
Figueras, J. 40
Firma Tero 18-43
Golden, B. 13-15-36
Heroldo de Esperanto 22
IKEL 19-21
Interferoj de la kataluna en Esperanton kiel fonto de eraroj 18-31-32
Internacia E-Semajno 3
Internaciāj Floraj Ludoj 8-10-21-25-27-28-29-30-33-37-38-46-47
Internacia Junulara Semajno 23
Jordana, R. 11
Junulara E-Semajno 23

KCE (Kultura Centro Esperantista) 7
KEJ (Kataluna E-Junularo) 2-6
Kongresoj
Federacioj Langvedoko-Rusiljono kaj Provenco 44
Franca 16
Kataluna 41-42
SAT-Amikaro 45
Korespondado 12
Krucvortenigmoj 8-24-44
La Kvinpetalo 5
Martin Burutxaga, P.M. 5-37
Mayor Zaragoza, F. 23
Montagut, A. 7
Monumento Zamenhof 1-3
Mora i Arana, G. 42-45
Mormonaro 45
Palamós 8-9-10-17-26
Perera, R. 33-37-38
Pujulà i Vallès, F. 8-10-21-25-38
Radio 12
Renkontiĝoj 9-11-19-35
Reza Kheir-khah 11
Ribes, S. 33
Rofes, J. 40
Rubió, D. 35
Sabadell 1-3-11-18-43
Servoj KEA 12
Slovaka Literaturo 18
Tarragona 41-42
TEJO 23
Toledano, R. 7
Torras, A. 33
Unesko E-Grupo 43
Ungar, K. 33-37
Unua Igualada E-Rendevuo 2
Vraca 24
Yzaguirre 33
Zamenhof-Festo 43

FELIĈAN 1991!